

Mario-skulptaĵo el Enebak


# LA SKOLTA MONDO

Trimonata revuo

Volumo 4. Numero 25.
unua Jarkvarono 1975.
jan.- marto 1975.

# S ☆ E ☆ L

Fondinto: "Avoto".
Kunfondinto: J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj:
Avoto, Norman Booth, D. H. Davis, L.J. VanGulck.

Prezidanto: John Berggreen, Brattvollveien 23c, Oslo 11, Norvegujo. Telefono 02-283035.

Sekretario: J. K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando. Poŝtkonto 632246. Telefono 075-166931.

Kasisto kaj Administranto de "La Skolta Mondo": David H. Withey, 21. Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool L 22 3ye, Britujo. Telefono 051-928-2936

Redaktoro: Hans Amund Rosbach, Nergata 37c, N-6500 Kristiansund N, Norvegujo. Poŝtkonto 8030413. Telefono 072-77620.

Membro de Centra Komitato

Ŝindo -Seitaro, Nisimikuni 1- tyôme 200, Higasi - yodogawa - ku, Osaka-si, Japanujo.

La Skolta Mondo aperas kvarfoje en la jaro.

Okaze de nericevo, **bonvolu** informi la Nacian Reprezentanton aŭ la Administranton.


*Karaj amikoj!*

Denove mi uzas ĉi tiun duonpaĝon al privata "korespondo". Mi ja ricevas multajn leterojn, kaj nur malofte trovas la sufiĉan tempon por privata respondo. Mi ankaŭ ne povas ĉi tie respondi, eĉ ne malgrande, al ĉiu, aŭ al iu speciala, sed mi volas danki.

Mi ricevis leterojn kun esprimoj de kontento pri nia gazeto. Tiaj, kompreneble, faras al mi ĝojon. Aliaj donis konsilojn, faris sugestojn, havis petojn - kaj ankaŭ al tiuj mi sendas la koran dankon pro intereso kaj helpo. Eĉ pli al tiuj, bedaŭrinde tro malmultaj, kiuj sendis al mi artikolojn aŭ alian materialon.

El Usono mi ricevis kvanton da skoltaj gazetoj. Ili donis al mi persone ĝojon, dum mi trafoliumis kaj legis, kaj konstatis la diversecojn kaj silmilecojn de skoltismo en la du landoj. De la sama venis ankaŭ naci-jamborea koltuko, kiun mi kun fiero portos dum skoltestra renkonto iam en mia urbo, kiel videbla signo de la kontaktoj, kiujn la Skolta Esperanto Ligo donas.
Mi ankaŭ ricevis kelkajn aliajn skoltaĵojn, kaj kune kun tiuj, kiujn sendis iu nederlandanino antaŭ jaroj ili nun beligas la ĉekampfajran surtuton, kiun mia entuziasma skoltfilo mem kudris. Kaj jen ankaŭ li per tio donas al la amikoj ateston pri utilo de nia Ligo.

La usonaj - kaj alilandaj skoltrevuoj kiujn mi ricevas, donas al nia revuo bildmaterialon kaj ideojn. Ankaŭ fotoj alsenditaj same estas tre valoraj. Sed nun mi havas peton: Se iu el vi sendis al mi foton kiun li/ŝi deziras rehavi, kaj ne ricevis ĝin, bonvolu skribi ankoraŭfoje, ĉar mi verŝajne ne plu memoras, kiu sendis ĝin al mi. Mi havas kvanton en mia tirkesto, kaj ne scias, kien sendi ilin. Dankon.
Kaj jen mia novjara saluto al vi ĉiuj, per la unua numero de la jaro 1975, ĵamborea jaro.

*Hans Amund*

# SKOLTA ESPERANTO LIGO

## *Jarraporto 1974*

La jaro 1974 estis por SEL utila jaro. La antaŭpreparoj por la Monda Ĵamboreo progresis kaj multaj el niaj deziroj estis plenumitaj.

La enkonduko de membrokartoj kaj jarkuponoj montriĝis tre utila por pligrandigi la internan forton de la Ligo.

La kontakto kun la plej multo de la Naciaj Reprezentantoj estis pli kontentiga ol dum multaj jaroj.

La redaktoro sukcesis eldoni la gazeton kun admirinda reguleco, kaj plaĉa laŭ aspekto kaj enhavo.

La dua eldono de la lernolibro (el 1969) preskaŭ tute elĉerpiĝis. Ni do devis presigi novan kvanton, speciale ĉar ĝi ne devas manki dum la venonta Ĵamboreo. Tio tamen donis al ni grandajn praktikajn kaj financajn problemojn. En la lasta semajno de la jaro nia Reprezentanto por Germanujo tamen surprizis nin per plaĉa eldono en malgranda formato. La libro facile eniras la poŝon, ĝi estas malmultekosta kaj postulas malaltan afrankon ĉe sendado. La positivaj ecoj do multe superas la negativajn, kaj jam ĝi estas kore bonvenigita de multaj flankoj.

Alia grava okazintaĵo estis la dua, plibonigita eldono de Skolta kaj Tenduma Terminaro, jam elĉerpita ek de 1965!

Novaj faldfolioj pri SEL, tiom gravaj por propagandi nian idealon dum skoltaj kunvenoj, aperis en Germanujo, Aŭstrujo kaj Britujo.

Pluraj artikoloj aperis en la skolta gazetaro, inter alie en Francujo, Finnlando, Aŭstrujo kaj Norvegujo.


Propagandaj kampanjoj multloke okazis. Menciindaj estas tiuj en Britujo (dum skolta tendaro internacia Peak), Belgujo, Kanado, - kaj la vojaĝo de nia prezidanto al Finnlando.



TIE, en la poŝo

estas la nova, mirige malgranda JAMBOREA LINGVO nur 14 x 10 cm !

kaj...
ĝi kostas nur 1.80 Nederl.guldenoj. inkl. afranko.

Mendebla ĉe la sekr.



La ĵamboreo igas vin iri al lando de vikingoj, kaj ĉi tiu numero de LSM prezentas al vi per 3 bildoj iom de la norvega historio. Ofte la religio estas historio, kaj la historio signoj de la religio!

Niaj bildoj estas historie-religiaj

Super ĉi tiuj linioj estas la steveno de ŝipo. En la jaro 1903 kamparano venis al la Historia Muzeo kun lignopecojn kiujn li trovis. Temis pri fragmentoj de iu ŝipo, kaj tiel oni trovis senkomparan tombon el la vikinga tempo: la tombon de la reĝino Åsa - patrino de la reĝo Halvdan kaj avino de tiu kiu kreis el Norvegujo unu landon.

La enhavo de la tombo estis tre riĉa: Ne nur la ŝipo - en kiu la reĝino faru sian

La Reprezentanto en Brazilo multe vojaĝis en sia lando, kaj multloke propagandis nian lingvon, sed ceteraj komunikoj el tiu lando bedaŭrinde ne abundas.

Dum la Universala Kongreso en Hamburgo okazis kunveno, kiu klare montris la amikecan atmosferon kaj aktivecon, kiuj regas en nia Ligo. Dum la kongreso ankaŭ okazis kelkaj interparoloj inter la prezidanto kaj la sekretario. La sekretario tie faris la unuajn kontaktojn kun esperantistoj el landoj ĉirkaŭ Irano, kiel unua ago por nia kampanjo en rilato kun la 15-a Ĵamboreo, kiun ni volas uzi por disvastigi SEL i.a. al la arablingva mondparto. Tempomanko tamen malhelpis la utiligon de tiuj kontaktoj jam dum la kuranta jaro.

Malaperis niaj reprezentantoj en Finnlando kaj Danlando, sed feliĉe la laboro tuj estis daŭrigata de aliaj.
La Reprezentanto de Finnlando samtempe eksiĝis el sia funkcio en la Centra Komitato.
Por Usono, post multaj jaroj de malfacilaĵoj, ni nun fine trovis personon kun sufiĉa sento de respondeco.

Al tiuj, kiuj dum pluraj jaroj servis la Ligon en tre bona maniero, ni kore dankas, kaj ni eĉ esperas renkonti ilin poste en alia funkcio ie en la Esperanto-Movado.
Al la novaj helpantoj ni deziras feliĉon kaj kontentigan laboron en agrabla atmosfero.

La plejmulto de la Reprezentantoj sendis jarraporton, aŭ regule komunikis al ni letere pri sia sekcio.
En Aŭstralio nova NR estu trovata por anstataŭi Stan Milligan, kiu deziras eksiĝi.
El Hispanujo ni nek ricevis jarraporton nek leterojn, kaj ni eĉ ne scias, kio okazis pri la skoltoj, kiuj petis informon pri S.E.L. ĉe la sekretario.
Italujo ankaŭ ne sendis informojn. Ŝajnas ke la NR pro personaj kialoj ne povas bone funkcii. Tio povas trafi nin ĉiuj, sed estus bone se aliaj sekciaj membroj povus transpreni almenaŭ parton de tiu grava tasko, por ke la laboro okazu bone.
La kontakto kun Kanado okazis nur per la help-NR.
Kvankam ni scias, ke en Nov-Zelando oni ne dormis, rekta raportado ne okazis. El Londono venis tamen demandoj de la Skoltina Organizaĵo pro kampanjoj faritaj en N.-Z..
Portugalujo ne raportis, nek nia peranto en Svedujo.
La kontakto kun nia NR en Zairo tute malaperis pro politikaj kaŭzoj. La registaro de la

vojaĝon al la regno de la mortintoj kune kun sklavino, sed ankaŭ ĉiaspecaj kaj riĉaj iloj, inkluzive la kultvagonon, kiu estas bildigita sur la lasta paĝo de la gazeto nia.

Per la lignogravuro -bestokapoj kaj serpentoj interplektitaj - ni povas lerni pri la kredo, kaj samtempe admiri ilian lertecon.

En la vikingo-ŝipodomo sur Bygdøy en Oslo vi povas vidi la originalojn.

Sed Norvegujo kristaniĝis. La kovrila bildo unuapaĝa atestas pri tio: Mario-skulptaĵo el norvega preĝejo montras ke la norvegoj adoris Dion laŭ la Romkatolika konfeso.

Tiun skulptaĵon vi povas vidi en la Historia Muzeo, en Oslo. Ankaŭ ĝi estas ligna, kaj atestas pri majstreco de la skulptistoj.

Rekomendinda estas vizito al preĝejoj ne tro longe for de Lillehammer:
La malnovan en la muzeo de la urbo. mem




JEN, ĝi estas!

SKOLTA kaj
TENDUMA TERMINARO.

Klarigo de ĉirkaŭ 400 skoltaj vortoj, kun multaj bildoj.

Prezo : 3 Ned.guld inkl.afranko.

Mendu ĉe la sekr.de SEL.

lando forte kontraŭbatalas eksterlandajn influojn, kaj ni nur povas esperi ke nia amiko estas sana kaj bonfartas.

Nia raporto povas esti nur mallonga. Ni estas certaj, ke multloke estis aktivecoj de SEL, pri kiuj ni ne raportis ĉi tie, kaj parte eĉ tute ne scias, pro la modesteco de niaj kunlaborantoj.

Kiam oni komparas nian grandegan laborterenon - 20 milionoj da geskoltoj, kun la malgrandeco de nia Ligo, oni povas nur kun bedaŭro konstati, ke denove la cetera esperantistaro ĝenerale nur tre malmulte helpis al ni.

Kiom multe da utila laboro okazus, se la Esperanto-Movado decidus unuece centrigi la fortojn kaj klopodojn je unu loko anstataŭ konstante lanĉi novajn planojn kaj ideojn.

Rigardante la pasintan jaron, ni povas esti kontentaj, kaj kun fido rigardi la estonton. Certe malfacilaĵoj venos antaŭ, dum kaj post la Monda Ĵamboreo en Norvegujo. Sed ni kune kuraĝe rigardos ilin, kaj certe ni ofte venkos.

bilditan en pli frua numero de LSM, kaj la preĝejojn de Ringebu kaj Sør-Fron, el tre malsimilaj epokoj.


Apud la lasta vi povas vidi la bienon Hundorp kun multaj tombaltaĵoj el la pratempo. Tiu bieno estas fama pro la rolo dum la kristanigo de Norvegujo:

Tie la kristana reĝo Olav renkontis la paganajn kamparanojn sub gvidado de "Dala-Gudbrand", kiu 'igis la idolojn elporti el la sanktujo por timigi la viraron de la reĝo. Sed iu el la viroj alfrapis dibildon, ke ĝi frakasiĝis, kaj jen elkuris amaso de musoj kaj ratoj. Kaj per tio la bildoj perdis sian potencon kaj forton.

# Por NI

la senkompare plej grava evento de la jaro estas Nordjamb 75. Sed ni ne rajtas forgesi la aliajn okazontaĵojn, precipe en la mondo de esperantismo.
La Universala Kongreso okazos en Kopenhago, kaj salono estas mendita por SEL-renkontiĝo al kiu programo ankoraŭ ne estas preta. Verŝajne tiu renkonto fariĝos nur amikeca interparolo - pro la ĵamboreo, kiu bezonas ĉiujn laborfortojn de la prezidanto kaj sekretario.

El la informoj, kiuj alvenas al la redakcio, ni povas kompreni, ke oni alcelas ion novan, eble eksperimentan, dum la kongreso. Decas ne juĝi antaŭe. La ĝisnuna kadro de la kongresoj estas jam elprovita - sed se oni ne eksperimentas, oni stagnas.



# Antaŭ

la UK la kongreso de KELI okazos en la sveda urbo Jönköping, apud la granda lago Vätteren. La urbo portas la kromnomon "Jerusalemo de la nordo". La kongresantoj loĝos en la domoj de iu "Folkhögskola" - t.e. internatlernejo por junuloj.
Tempo: 19a-26a de julio
Adreso: F-ino Ahlren, Högbergsg 31 A II, S 116 20 Stockholm.

# Post

la UK (3a-6a de aŭg.) postkongreso en Aarhus kun alloga programo, i.a. ekskurso al la pitoreska "Ĉielmonto" ĉe Silkeborg, Adreso: Hørmarksalle 5, DK 8240 Risskov.

# La skoltismo en Usono.

Fine de la jaro 1909 iu riĉa usona eldonisvo ekvojaĝis de Nov-Jorko por ĉasadi en Afriko. Li haltis en Londono por aĉeti ekipaĵojn, kaj tie li havis neatenditan sperton, kies rezulto estis la skolta movado en Usono.




Nuntempe, pro la kontraŭpoluciaj leĝoj tio ne plu okazas, - sed en tiu tempo Londono suferis multe kaj ofte pro la dika "pizosupa" nebulo, kiu kaŭzis mortojn, difektojn kaj ĥaoson en la urbego. La usonano de nia historio, William D. Boyce, iun nokton perdiĝis en ĉi tia nebulaĉo, kaj tute ne povis retrovi la vojon al la hotelo. Finfine li ekvidis la figuron de knabo, kaj maltrankvile la plenaĝulo petis, ke la knabo montru al li la vojon al la hotelo. Anstataŭe la knabo gvidis la sinjoron tien, kaj atinginte la lokon malakceptis moneron oferitan de s-ro Boyce. La knabo diris ke li estas skolto, kaj por bona ago oni ne rajtas akcepti pagon. Li foriris sen mencii sian nomon, kaj la nomo de tiu helpema skolto restos por ĉiam nekonata.

la sekvantan tagon kun granda scivolemo Boyce iris al la skolta oficejo por informiĝi pri la movado, kiu havis tiel bonan efikon. Li konvinkiĝis pri la valoro de la skoltismo kaj aĉetis librojn kaj uniformojn por Usono.

Ree en Novjorko li diskutis la aferon kun kelkaj amikoj, kaj fine organizis la knabskoltojn de Usono. La movado rapide kreskis, kaj baldaŭ la nacia Kongreso mem rekonis ĝin, kio donis grandan antaŭenpuŝon kaj eĉ pli grandan kaj rapidan kreskon.

Hodiaŭ troviĝas skoltoj en ĉiu urbeto en ĉiu ŝtato de la unuiĝo de usonaj ŝtatoj. En la plej izolitaj lokoj estas la solulaj skoltoj. Tamenaj ŝkoltoj estas knaboj kun fizika aŭ mensa malsano, tamen ili estas skoltoj. Ni ankaŭ havas marskoltojn kaj aeroskoltojn. Fine ankaŭ skoltinojn kiuj apartenas al tute aparta organizaĵo.

Ĉe ni la skolteto nomiĝas "ido" (mallongigo por lupido, ursido, leonido), kaj havas bluan uniformon. La tri rangoj de la ido estas lupa, ursa kaj leona. Pli aĝaj idoj eniras la seson (aŭ bestejon) Webelos, kie ili pretiĝas iĝi skoltoj.
Poste, 11-jaraĝa, li eniras en la skoltan trupon. La skolta uniformo ĉiam estas helkakia, sed la trupo rajtas mem decidi kian ĉapelon oni surhavu, ĉu uzi pantalonetonaŭ pantalonon, stilon de la ĉemizo ktp. La patrolaneco estas afero de la unuopula prefero. La skoltaj rangoj estas: skolto, molpiedulo, duagrada, unuagrada, stela, viva, agla. Inter la agloskoltoj estas kelkaj usonaj prezidantoj, inkl. la nunan, prez. Ford. La unua homo sur la luno estas agloskolto!

Jen la Skolta Leĝo kaj la Skolta Promeso, kiel ni diras ilin:



La skolta leĝaro:
La skolto estas:

1. fidinda
2. lojala
3. helpema
4. amikema
5. ĝentila
6. kompatema
7. obeema
8. gaja
9. ŝparema
10. kuraĝa
11. pura
12. pia

La skolta promeso:

Je mia honoro, mi agos ĝis mia plenkapablo
por plenumi miajn devojn al Dio kaj al mia lando,
por obei la Skoltan Leĝaron,
por helpi aliajn personojn ĉiam,
por teni min fizike forta, mense vigla kaj morale rekta.

Via en skolta frateco,

Allan E. Fineberg



Thor - la dio de tondro - estis tre grava en la pranorda religio. Lia vivo estas priskribita en la "Malnova Edda" per pluraj kantoj. Dum Thor antaenveturis per sia vagono, tirita de du virkaproj, fulmotondris, kaj per sia martelo kiun li ĵetis, li povis trafi kiun ajn.

Kia estos nia influo ĉe la ĵamboreo?

Kompreneble neniu scias. La influo kaj la rezultoj dependas ne nur de la gvidantoj, sed same - aŭ pli de la unuopaj partoprenantoj.

Ni konas la nomojn de 23 SEL-anoj el 10 landoj, partoprenontaj la ĵamboreon.

En la lastfoja ĵamboreo multo malsukcesis pro la nekono: "Mi renkontis eĉ ne unu esperantisto dum la ĵamboreo".

Vi mem komprenas, ke nura hazardo povas igi vin renkonti unu el tiuj 23 inter la miloj da partoprenantoj.

Tamen: Se vi konas la nomon, naciecon, subtendaron ktp vi ne bezonas hazardon sed nur initiativon por trovi amikon - kun kiu vi povas interparoli! Aŭ tiu alia povas serĉi vin!

Tial, kara amiko, se vi iros al la ĵamboreo:
Sendu informon pri tio al nia prezidanto (s-ro John Berggreen, Brattvollveien 23c, Oslo 11, Norvegujo), kaj vi per tio helpas vin mem, la aliajn SEL-anojn ĉe Nordjamb - kaj ne malpli:

La tutan laboron de Skolta Esperanto Ligo.

Ni sukcesu!

# 40 + 1

Skolta Monda Oficejo jam akceptas leterojn en kvardek lingvoj, kvankam, kompreneble, ne ĉiuj tiuj lingvoj estas "oficialaj".

Nia unua paŝo estas aldoni ankoraŭ lingvon, La Internacian, Esperanton.

Sed ni devas neniam forgesi, ke la celo devas esti en la internacia komunikado malnecesigi la uzon de la 40.

# 61-62

La Estraro de UEA decidis, ke la 61-a UK okazu en Ateno, kaj principe decidis, ke la 62-a okazu en Reykjavik.

Ambaŭ landoj, Greklando kaj Islando, estas "fremdaj" landoj al nia movado SEL, kaj tio donas al la ligo novajn taskojn, novajn celojn. Jam nun decas komenci la preparan laboron, por krei kontaktojn en tiuj du landoj. Kaj kompreneble la CK kun ĝojo akceptas ĉiun helpon tiurilate.



Ni ankaŭ ne rajtas forgesi la "virinan jaron".
Ĝis nun ni havas nur unu virinon en ofico de Nacia Reprezentanto kvankam la nombro de skoltinoj en la mondo atingas grandegajn ciferojn.

Ni devus pligrandigi nian reton de Naciaj Reprezentantoj, ne nur tiel, ke ni havu NR en ĉiu lando kie la skoltismo ekzistas, sed ankaŭ tiel, ke tiu reto duobliĝus, kun vic-NR - kaj unu el ambaŭ estu virino, unu viro.

Al niaj virinaj legantoj ni rektas la admonon: Kontaktu

a. la NR de via lando, se tia estas, kun propono pri kunlaboro.
b. la ĝeneralan sekretarion, se via lando ne havas NR.

Tamen ni devas substreki, ke foje estas pli bone havi neniun "kunlaboranton" ol havi nomon de persono kiu nenion faras.

SKOLTO FARAS SIAN DEVON.

## *Unua-tagaj kovertoj*

La norvega poŝto eldonos poŝtmarkojn memorige al la Nordjamb.
SEL planas fari specialajn kovertojn por tio, kun motivo vikinga ŝipo kun ŝildoj kun skoltaj simboloj, velo kun nia stelo kaj standardo kun la insigno de la ĵamboreo.
La koverto ankaŭ estos tre taŭga por la leteroj al gepatroj!

# De kie devenas la nomoj de la mono?

Oni legas fremdan gazeton. Jen io, kion mi deziras aĉeti. Sed la prezo estas en marko, peso, dolaro, guldeno... Jes, certe mi povas trovi en banko liston pri la nuna valoro de la ekster-landa valuto. Sed de kie oni ricevis la diversajn nomojn?

Multaj origine estis pezunuoj. La Marko - monunuo de Germanujo kaj Finnlando, estis pezunuo de nordaj landoj jam en la vikinga tempo, kiu ek de la mezepoko ankaŭ ekuziĝis en la aliaj Eŭropaj landoj. Ankoraŭ oni kelkloke povas aŭdi: Markon da butero, mi petas, kaj oni pensas pri kvarona kilogramo - kaj la marko estis plej ofte inter 210 kaj 250 gramoj.


Ankaŭ pundo estis pezunuo - en Esperanto funto. La nomo devenas el latina "pondus", kio signifas pezo. Kaj la signo £ estas L, kaj signifas "libra", malnova roma pezunuo egala al la funto. Tio ankaŭ iĝis al liro, la itala monunuo.

Peso - kun la diminutiva formo peseto, ankaŭ signifas, jes - pezo. Sed Eskudo signifas ŝildo kaj verŝajne devenas de la ornamenta blazono sur la monero, la indiko de la reĝo, kiu faris la monon.

Ankaŭ franko devenas de la surskribo de la monero: Francorum Rex, t.e. reĝo de la francoj, - dum Guldeno havas sian nomon de ormonero, Gulden Pfenning, kiu estis uzata en Germanujo, Aŭstrujo kaj Hungarujo de la 14.a - 17.a jarcento.


La nomo drakmo originas en pratempo, kiam oni uzis malgrandajn ferpecojn kiel pagilo (de la 7.a jarcento a.Kr.), kaj la malnovgreka vorto dragma signifis manplenon, en praktiko 6. Rubel referencas al rubitji, kio signifis "elrompita peco", kaj Yen verŝajne estas ĥina vorto yuen, t.e. "io ronda".

La denaro - el latina denarius, tio estas "kio enhavas dekon", kiel multaj monnomoj havas interesan historion. Ĝi estis la plej grava arĝenta monero de la roma respubliko kaj imperio sed iom post iom malplivaroriĝis - kaj fariĝis bronza monero. Tiu monero ludis gravan rolon. Karlo la Granda enkondukis ĝin, dividante la pundon en 20 soldoj, (komparu: soldato!) kaj la soldon en 12 dinaroj. Unu funto de pura arĝeno tiel fariĝis 240 dinaroj. Kaj jen la klarigo de d. kaj s. kiel mallongigoj de la "malnova" angla mono.



Alex Philip kaj Edith Philip, kanadaj instruistoj, emeritiĝos kaj intencos iri al Eŭropo. Pro tio ili proponas al izolitaj kluboj, kiel al grupetoj kaj individuoj servon per intensa kurseto por plialtigi la lingvoscion. Rekompence ili deziras taŭgan, ne tro multekostan loĝadon.
Skribu al la adreso 1319 Selkirk Avenue, Kamloops, B.C., Kanado V2B 1V8 - antaŭ la fino de majo.

Feriosemajno en Svislando! De la 31.a de aŭg. ĝis la 6.a de spt. okazos la 16.a eŭropa ferio semajno en hotelo Fürigen ĉe Vierwaldstättersee-lago, kun riĉa programo. Prezoj ek de 270 sv. frankoj.
Skribu al Ernst Glättli, Laustrasse 17, CH-5200 Brugg.



# Ni devo al DIO kaj homoj

Estas ja grandaj vortoj! Kiu povas plenumi ilin? Kiu konas la devon al Dio? Ĉu la kristano? Ĉu tiuj vortoj koncernas nur lin? Eble eĉ nur la kristanan pastron?

Nepre ne. La vortoj pri devo al Dio kaj al homoj estas troveblaj en la promeso de la skoltoj!

Ĉu oni dece povas postuli tian promeson? La plenkreskulo, t.e. la skoltestro, devas scii el la propra sperto, ke li mem ne sukcesis.

Li ne faris sian devon al Dio. Eble eĉ ne plene sian devon al homoj. Jes - certe ankaŭ ne tion.

Ĉu ni forstreku la vortojn? Mi ne kredas tion. Nia skoltismo nepre ne gajnas - eĉ grajnon - per tio.

Kion ni faru?

Iam oni diris - inter skoltoj: "La malfacilaĵojn mi venkas tuj. Por la neebla mi bezonas pli da tempo."

Ankaŭ en nia religia ekzercado tio estas la vojo irinda. La malfacilan, por ekz. la komenco per studo de niaj sanktaj skriboj, vizitado ĉe diservoj, preĝo al Dio, mi tuj ekfaras. Per tio mi plenumas parton el miaj devoj. La bonan agon al la homo, kiun mi renkontas, mi ankaŭ faras, kaj tiel denove plenumas eron el la devoj.

Ankaŭ la apostolo Paŭlo diris tion: "Ne kvazaŭ mi jam trafis, aŭ jam perfektiĝis; sed mi min pelas antaŭen."

Nia devo al Dio kaj homoj do ne estas la perfektita ago, sed:

NENIO IAM PERFEKTIĜOS, SE NI NE KOMENCOS, KAJ NENIO ESTOS FARATA SEN MODESTA KOMENCO.

# Bona ideo

De la Pola Esperanto Asocio ni ricevis malgrandan kajeron: Turisma Esperanto Kalendaro 1975

Estas vere bona ideo: Per malgrandaj rubrikoj estas prezentataj la eventoj de la Esperantujo.
Sed la rezulto povus esti pli bona. Pri multo la redakcio ne respondecas: Kiam informoj ne ekzistas, oni ne povas pluendoni ilin. Tial, ekzemple, la KELI-kongreso kaj la postkongreso - pri kiuj ni informas aliloke, ne troviĝas en la kajero.
Sed la preso devus esti legebla - ĝi plurfoje ne estas - kaj ni bedaŭras la fuŝan laboron, almenaŭ en nia ekzemplero.



NACIAJ REPREZENTANTOJ:

Aŭstralio: s-ro S.H.Milligan, 14 Kerry Close, Doncaster E 3109, Victoria.

Aŭstrio: s-ro Franz Schwärzler, Rathausstrasse 2, A-6900 Bregenz.

Belgujo: d-ro Eddy Frederickx, Hennepstraat 10, B-2060 Merksem-Antwerprn. Poŝtĉekk 9978.93. Tel(031)4524.76
s-ro L.J.VanGulck, Lt.Lippenslaan 33, B-2200 Borgerhout. Poŝtk.to Belga Skolta Esp.-Sekretario 000-0327460-85. Tel (031)3688.08.

Brazilio: s-ro Euclides C Soares, Av. Almirante Tamarande 979, Belem, Para

Britujo: s-ro C.Bardsley, 42 Westbourne Str., OL9 6AR Oldham, Lancs.

Danlando: s-ro Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK-2600 Glostrup.

Finnlando: s-ino Irja Klemola, Nunna, SF-20660 Littoinen

Francujo: s-ro Petrick Deveughele, 53 Av.de Rigny, Appt 64, F-94360 Bry sur Marne.

Germanujo: s-ro Georg D. Winkler, Haroldstrasse 47, D-41 Duisburg 1.

Hispanujo: s-ro Pedro Marqueta, F el Catolico 32, 5°izqda, Zaragoza. Tel 252044.

Irlando: s-ro Frank Dobbs, 8 Ailesbury Grove, Dublin 4.

Italujo: s-ro prof. F Tulone, Via Frangipene 8, I-92019 Sciacca, Agrigento. Tel 21.198.

Japanujo: s-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K. 16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.

Kanado: s-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest Ont.
Helpa NR: S-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb.

Nederlando: s-ro B.J.Wijmer, De Perponcherstr 118, Den Haag 2004. Tf 852359.

Norvegujo: s-ro H.A.Rosbach. Vidu paĝon 2 sub "redaktoro".

Novzelando s-ro D.B. Pease, Flat 2, 8 Dent Street, Whangarei.

Portugalujo s-ro J.de Matos Correia, Rua Cidade da Horta, Lote Q-5-3°, Pontinha, Lisboa 4.

Svedujo: Peranto: s-ro Ragnar Hjorth, Kronobergsgt 25, S-11233 Stockholm.


Usono: s-ro : Allan Fineberg, 76 Seventeenth Ave, Paterson N.J. 07513.

Informoj pri membreco:
En landoj kun Nacia Sekcio: Informiĝu ĉe NR kaj pagu al li la kotizon.

Individuaj membroj (Nur en landoj sen N.R.!) Kotizo inkl. abono:
Junuloj ĝis 18 jaraj: Ned.gld. 3.30 aŭ egalvaloro.
Pliaĝuloj: Ned. gld. 5.oo aŭ egalvaloro.
Subtenantoj: Minimume Ned. gld. 5.oo aŭ egalvaloro.

Adresoj de la Centra Komitato: Vidu la duan paĝon.

Konstanta adreso de S.E.L.: Postbus 433, Zaandam, Nederlando.



Kult-vagono el la norvega pra-tempo pagana. Trovita en tomb-altajo.

# LA SKOLTA MONDO





OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTO LIGO

Limtempo por manuskriptoj kaj anoncoj: 1.a de Februaro, Majo, Aŭgusto kaj de Novembro.

---

REDAKCIO: N-6500 KRISTIANSUND
NE ISSN 0037-6558

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL